

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 11

Novembro, 2016



Karaj legantoj, nekutime, sed mankas literaturaĵoj en ĉi numero, sed abundas interesa pri-Esperanta kaj lingva informo. Unue, Puramo Chong, vic-prezidinto de nia E-societo, kiu antaŭ 10 jaroj revenis al Koreio, nun estas membro de la LOK de UK-102 kaj esperas pri renkontiĝo en Seulo venontjare.

Pri-Esperanta anglalingva libro kaŭzis ondon da recenzoj: en "The New Yorker", "The Los Angeles Review of Books". De niaj samideanoj reeĥis Steven Brewer en Libera Folio kaj aktiva nia societano H. Becklin, fragmentojn de kies recenzo vi trovos malsupre.

Nia prezidanto L. Kordylewski esperantigis artikoleon pri la sorto de la angla en EU. Do, agrablan legadon.

—La Redaktoro

Invito al Seula UK de Puramo Chong, Eks-membro



La memoro pri mia plurjara vivo en Ŝikago, kvankam dek jaroj jam pasis, estas ankoraŭ klara en mia koro. Precipe memoroj pri Ŝikaga Esperanto-Societo restas ĉe mi tiel klara, kiel ĵus okazintaj aferoj; monata kunsido, pikniko kaj Zamenhofa festo, redaktado de bulteno "Saluton!" ktp. Ankoraŭ klaras ĉe mia memoro la vizaĝoj de membroj kaj mi ja sopiras al tiuj simpatiaj, afablaj geamikoj. Mi nur bedaŭras, ke kelkaj el tiuj jam ne plu videblas. Mi ĝojus, se mi povos revidi tiujn kutimajn vizaĝojn baldaŭ en mia urbo, okaze de la sekvanta Universala Kongreso. Mi skribas ĉi tiun artikolon kun kora deziro renkontiĝi kun miaj malnovaj geamikoj de Ŝikaga Esperanto-Societo. Venontsomere, kiel vi scias, okazos la 102a Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo de Koreio, Seulo. Ĝi estas la dua UK en Koreio (la unua okazis antaŭ 22 jaroj en 1994). Maloftaj okazoj de UK en aziaj landoj fariĝus unikaj ŝancoj por eŭropaj kaj usonaj

esperantistoj gustumi ekzotikajn spertojn, ĉar kulturo, tradicio kaj historio estas sufiĉe fremdaj kaj ĉiuaspekte malsamaj al tiuj de ne-aziaj landoj. Seulo estas metropolo kun dek milionoj da loĝantoj kaj jam havas 600 jarojn kiel ĉefurbo de Ĉosun dinastio. Multaj eksterlandanoj vizitas ĉiujare la urbon, Seulo, miksitajn kun moderna tekniko kaj tradicia kulturo, kaj ĝuas ekzotikan etoson de la urbo. Esperanto-movado en Koreio ankaŭ havas sufiĉan potencon kun preskaŭ 100 jaroj da historio. Korea Esperanto-Asocio posedas sian propran domon kaj havas multajn aktivajn membrojn. Unika estus la fakto, ke la membraro konsistas el relative juna generacio, kaj tial eksterlandaj esperantistoj ofte sentas en la movado energian kaj dinamikan etoson. Loka preparkomitato nuntempe diligente laboras por sukcesa kongreso, kaj la programeroj, ekz. kulturaj tradiciaj aranĝoj, ekskursoj, porjunulaj programoj estas ellaboritaj por kontentigi partoprenantojn el eksteraziaj landoj. Mi plejkore invitas vin, ĉiujn membrojn de la Ŝikago E-Societo al venontsomera UK kaj kun varma bonvenigo baldaŭ volus ĝoje revidi vin en la kongresejo. Ĝis la!



Ponto el Vortoj de Hanso Becklin

La 4an de Oktobro 2016 eldoniĝis granda, grava libro pri Esperanto. Esther SCHOR, profesoro pri la angla lingvo ĉe la prestiĝa Universitato de Princeton (Nov-Jerzejo, Usono), dum pluraj jaroj verkis tiun dikan libron pri Esperanto. Ĝi estas unu el la plej ampleksaj


historioj pri nia lingvo en la angla lingvo, kaj la ununura plena historio, kiu aperis el nefaka eldonejo. La libro nomiĝas *Bridge of Words*, sed eĉ sur la kovrilo ŝi donas al la leganto la ĝustan Esperantan tradukon: *Ponto el Vortoj*.

Kvankam Schor verkis sian libron angle, mi recenzas tiun libron Esperante. Mankas al ni nek anglalingvaj recenzoj fare de spertuloj (kaj en *La Los-Anĝeleso Librorevuo* kaj en *La Novjorkano*), nek anglalingvaj recenzoj fare de Esperantisto. Sendube, pluraj Esperantistoj, kiuj ne povas legi la libron (ĉu pro lingvoscio, ĉu pro manko de aĉetebblaj ekzempleroj en siaj landoj) interesiĝas pri ĝi. Tial, mi volas doni al ili guston de la vidpunkto de la aŭtoro kaj kritiki la libron kiel Esperantisto.

Ĉiu ĉapitro el la kvar fendiĝas en du plimalpli egalajn partojn, kun malsamaj manieroj rakonti kaj trakti la temon. La ĉapitroj ĉiam komenciĝas kun historio de la Esperanto-movado, tempe ordigitaj. Poste, Schor rakontas pri siaj spertoj en Esperantujo, ĉe kursaroj, kongresoj, kaj Esperanto-organizaĵoj.

Schor vere priskribas nian movadon kaj la esperantiston, ne kiel varbanto, sed kiel observanto. Spertinte ĉion en la libro, oni povus ataki Esperanton kaj esperantistojn furioze, sed tion ŝi neniam faras. La profesoro sendube tenas dubojn kaj esperojn pri la Esperanto-movado, samtempe skeptikulo kaj samideano. Sed ŝi ĉiam priskribas nin juste, kaj tio sendube fluas el ŝia amo. Kaj kia laboro la libro estis—ne nur lernado de lingvo, sed enketado, vojaĝado, analizado kaj verkado. Estus multe pli facile verki libron pri Zamenhof—pri Esperanto kiel mortinta lingvo nun senvalora. Gratulon al la aŭtoro, kiu prezentis Esperanton al anglalingvanoj amase.

—<https://esper.us/recenzo-de-ponto-el-vortoj>



Post Brexit la Angla Ne Plu Estos la Oficiala Lingvo de la Euxropa Unio

Neniu alia eŭropunia lando havas la anglan kiel ilian oficialan lingvon, do la angla povas perdi sian rolon. Danuta Hübner, ĉefulino de la Komitato de Konstituciaj Aferoj de la Eŭropa Parlamento (AFCO) admonis lastlunde, ke la angla ne plu estos unu el la oficialaj lingvoj de la Eŭropa Unio, post Britujo forlasos la Union.

La angla lingvo estas unu el 24 oficialaj lingvoj de la Eŭropa Unio, ĉar Britujo indikas ĝin kiel sian propran oficjalan lingvon, diris Hübner. Tamen, tuj post kiam Britujo kompletigos la eliran proceson en la Unio, la angla povos perdi sian statuson. “Ni havas la regulon... ke ĉiu memrolando de EU povas nomi unu oficjalan lingvon,” diris Hübner. “Irlando nomis la gaelan lingvon, Malto la maltan, do nur Britujo indikis la anglan.” “Se ni ne plu havos Britujon en EU, ni ne havos la anglan,” diris Hübner. La angla lingvo estas unu el laborlingvoj de eŭropaj institucioj, diris Hübner, aldonante: “Ĝi vere estas la dominanta lingvo, la plej ofte uzata de la oficistoj de EU”.

La regulo pri la listo de la oficjalaj lingvoj de EU necesus esti ŝanĝita unuanime pere de la restantaj landoj, se ili volos teni la anglan kiel la oficjalan lingvon, diris Hübner. Laŭ la klarigo de la EU fonto, la reguloj pri la oficjalaj lingvoj mem estas tamen tradukataj je plurlingvaj versioj. La EU aŭtoritato atentigas, ke en la regularo pri la oficjalaj lingvoj, kiu estis verkita en 1978 originale en la franca lingvo, oni ne klare indikas, ĉu la memrolando, kiel ekzemple Irlando aŭ Malto, povas havi pli ol unu oficjalan lingvon. Dependas de la interpretado de la franclingva vortuzo, ke oni emos permesi tiun eblecon, dum la anglalingva teksto evidente indikas malpermeson.

—*El la Angla: L. Kordylewski*

Komento: “Kia ĥaoso!!! Usonanoj gardu sin por ne perdi la anglan en la nuntempe kreskanta tendenco de plurlingvismo en Usono. Ha-ha!” —*L. K.*

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon!
Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

22an de Novembro – Pens-interŝanĝo

11an de Decembro 12:00-4:00pt – Zamenhofa Tago

